

01 JULI 1976

Limburgaĵ Esperanto novaĵoj

Driemaandelijks tijdschrift
van

Trimonata revuo
de

LIMBURGA ESPERANTO GRUPO - Kortestraat, 2 B - 3630 EISDEN / MAASMECHELEN
Tel. 011/76 44 66 P.Ĉ.K. 001-0377625-80

1/1 jul. Aŭg.sep. 1976

Konatiĝe.

Finfine, post multe da klopodoj kaj laboro, ankaŭ en Limburgo penetris la Esperanto-spirito.

Kio estas Esperanto ?

Moderna, belsona, facile akirebla, neŭtrala, universala helplingvo. Tiu lingvo permesas al kiu ajn havi kontaktojn kun personoj el la tuta mondo, fari amikojn ĉie en la mondo.

Konsidere al tiuj grandiozaj eblecoj, kelkaj Limburganoj grupiĝis, lernis la lingvon kaj nun disponigas siajn konojn al ĉiu kiu sin interesas al la afero.

Jam kelkaj dekoj da interesitoj sin prezentis kaj, por ebligi al ili praktiki la lingvon kaj al aliaj interesitoj sin informi pri la vivo kaj evoluo de Esperanto, decidis krei revueton du-lingvan - Esperantan/Nederlandan - de kiu vi nun legas la unuan numeron.

Ni esperas ke nia iniciato estos laŭ ĉies gusto kaj deziras al vi multe da lego-ĝojo, dum eventualaj rimarkoj kaj sugestoj estos danke atendataj.

Ter kennismaking.

Uiteindelijk is, na veel pogingen en werk, ook in Limburg de Esperantogeeft doorgedrongen.

Wat is Esperanto ?

Een moderne, welluidende, zich gemakkelijk eigen te maken, neutrale, universele hulptaal. Die taal stelt eenieder in de mogelijkheid contact te hebben met personen uit de hele wereld, vrienden te maken waar ook ter wereld.

Die grandioze mogelijkheden in aanmerking genomen, hebben enkele Limburgers zich gegroepeerd, de taal geleerd en stellen nu hun kennis ter beschikking van al wie er belangstelling voor heeft.

Reeds enkele tientallen geïnteresseerden boden zich aan en, om de mogelijkheid te scheppen voor hen de taal te beoefenen en voor andere belangstellenden zich te informeren over het leven en de evolutie van het Esperanto, besloten zij een tweetalig tijdschrift - Esperanto/Nederlands - te creëren, waarvan u nu het eerste nummer leest.

Wij hopen dat ons initiatief naar ieders smaak zal zijn en wensen u alvast veel leesgenot, terwijl eventuele opmerkingen en suggesties met dank ingewacht worden.

J.B.

Resuma historio de Esperanto.

La 15-an de decembro 1858 naskiĝis Ludoviko Lazaro Zamenhof, la kreinto de la universala helplingvo Esperanto, en la Pola urbo Bjalistok. En tiu urbo loĝis diversaj popoloj : Poloj, Germanoj, Rusoj kaj Judoj, kiuj ĉiuj parolis sian propran lingvon. Tio ofte estis kaŭzo de miskomprenoj, disputoj kaj eĉ bataloj.

Jam kiel juna knabo li spertis tiujn malfacilaĵojn kaj malagrabra sento tiurilate neniam plu forlasus liajn pensojn.

Dum li vizitis la gimnazion, kie li lernis diversajn lingvojn, li ekhavis la ideon fari artefaritan lingvon, kiu povus servi kiel internacia komunikilo. Miltajn provojn li faris antaŭ ol trovi la sistemon, pere de vortradikoj kaj de pre- kaj sufiksoj kaj pere de kelkaj sen-esceptaj gramatikaj reguloj, krei lingvon tre simplan kaj facile lerneblan.

Kun kelkaj lernantoj el lia klaso, kiuj interesiĝis pri la afero, li festis, la 5-an de decembro 1878, la ekeston de nova internacia lingvo. Tamen, je la fino de la gimnazia studado, ili disiĝis kaj Zamenhof restis sola kun sia projekto de artefarita helplingvo.

Li tamen daŭrigis la laboron, venkis multajn malfacilaĵojn kaj, dank al la helpo de lia fianĉino kaj ŝia patro, li en 1887 eldonis la unuan broŝuron de la "Internacia lingvo", kiun li subskribis per "Doktoro Esperanto", donante tiel nekonscie la nomon "Esperanto" al la de li ĵus kreita lingvo.

Baldaŭ li ricevis respondojn de fervoraj samideanoj diverslandaj kaj pli kaj pli la lingvo venkis la mondon.

Bekonopte geschiedenis van Esperanto

Op 15 december 1859 werd Ludovico, Lazaro Zamenhof, de maker van de universele hulptaal Esperanto, geboren in de Poolse stad Bialystok. In die stad leefden verschillende volken : Polen, Duitsers, Russen en Joden, die alle hun eigen taal spraken. Dat leidde dikwijls tot misverstanden, twisten en zelfs tot gevechten.

Reeds als jonge knaap ondervond hij die moeilijkheden en een onaangenaam gevoel daaromtrent zou zijn gedachten nooit meer verlaten.

Terwijl hij het gymnasium bezocht, waar hij diverse talen leerde, kwam de idee bij hem op een kunstmatige taal te maken die zou kunnen dienen als internationaal communicatiemiddel. Vele proeven maakte hij, alvorens een systeem te vinden waardoor het mogelijk was om, door middel van woordstammen en van voor- en achtervoegsels evenals door middel van enkele spraakkunstregels-zonder-uitzonderingen, een zeer eenvoudige en gemakkelijk te leren taal te creëren.

Met enkele leerlingen uit zijn klas, die zich aan de zaak interesseerden, vierde hij op 5 december 1878 het ontstaan van een nieuwe internationale taal. Echter, op het einde van de studies in het gymnasium, gingen zij uit elkaar en bleef Zamenhof alleen met zijn ontwerp van kunstmatige hulptaal.

Toch ging hij door met zijn werk, overwon vele moeilijkheden en, dank zij de hulp van zijn verloofde en haar vader, kon hij in 1887 de eerste brochure van de "Internationale taal" uitgeven, die hij ondertekende met "Dokter Esperanto" (= de dokter die hoopt), aldus onbewust de naam "Esperanto" gevend aan de door hem gemaakte taal.

Spoedig kreeg hij antwoorden van fervente geestesverwanten uit verschillende landen en stilaan overwon de hulptaal de wereld.

En 1905 okazis en Bulonjo sur Maro (Francio) la unua Universala Kongreso en kiu Zamenhof povis alparoli 800-o da esperantistoj el diversaj landoj. Ekde tiam, ĉiujare - krom dum la mondmilitoj kompreneble - okazus universala Esperanto Kongreso ie en la mondo, dum multege da renkontiĝoj internaciaj organiziĝas en ĉiuj landoj kaj regionoj.

Kompreneble, kiam Zamenhof forpasis en 1917, li eble povis supozi, sed certe ne sciis ke lia lingvo, ĉar ĝi, per sia simpleco kaj neŭtraleco, ebligus al ĉiuj popoloj bone sin kompreni kaj, do, vivi en paco, ne estus tre ŝatata de certaj potenculoj, kiuj volis superregi la mondon kaj tial preferus altrudi sian propran lingvon por akiri kiel eble plej multe da supero.

Klare do estas ke Esperanto ne povis evolui normale, estante ĉu persekutata, ĉu malpermesata, ĉu malhelpata, ĉu simple mort-silentata.

La tasko de la esperantistoj do estis kaj estas diskonigi la universalan lingvon tra la mondo kaj krei la eblecon ĝin akiri kaj ĝin uzi al ĉiuj interesitoj.

Tio cetere estas la ĉef-celo de nia grupo kaj de nia nuna revuo.

In 1905 vond het eerste Universeel Congres plaats in Boulogne sur Mer (Frankrijk) waar Zamenhof een 800-tal esperantisten uit verscheidene landen kon toespreken. Van toen af zou ieder jaar - behalve tijdens de twee wereldoorlogen natuurlijk - ergens ter wereld een universeel Esperanto Congres plaats vinden, terwijl zeer veel internationale samenkomsten georganiseerd worden in alle landen en regionen.

Natuurlijk, toen Zamenhof in 1917 overleed, kon hij misschien vermoeden, maar wist hij zeker niet dat zijn taal, omdat zij door haar eenvoud en neutraliteit aan alle volken de mogelijkheid biedt zich goed te verstaan en, dus, in vrede te leven, niet erg op prijs zou gesteld worden door bepaalde potentaten die de wereld wilden overheersen en er dus de voorkeur aan gaven hun eigen taal op te dringen om aldus zoveel mogelijk macht te verwerven.

Het ligt dan ook voor de hand dat het Esperanto niet normaal evolueren kon, daar het, hetzij vervolgd, hetzij verboden, hetzij verhinderd, hetzij eenvoudig doodgezwegen werd.

De taak van de esperantisten was en is dus de universele taal over de wereld bekend te maken en, voor alle belangstellenden de mogelijkheid te scheppen ze zich eigen te maken en te gebruiken.

Dat is trouwens het hoofddoel van onze groep en van ons huidig tijdschrift.

J.B.

DOKUMENTA SERVO

La Limburga Esperanto Grupo ankaŭ havas DOKUMENTA-n SERVO-n, ĉe kiu eblas pruntepreni librojn kaj revuojn. Multaj libroj ankoraŭ ne estas, sed ni esperas ricevi sufiĉe da ili, por dokumenti al niaj gemembroj kiel eble plej bone kaj por krei eblecon sin ekzerci kaj sin perfektigi per legado. Interesitoj petu informojn ĉe

Pierre WOESTENBORGHs, Medaerstraat, 11 B-3650 STOKKEM/DILSEN

DOKUMENTATIE-DIENST

De Limburgse Esperanto Groep heeft ook een DOKUMENTATIE-DIENST waar boeken en tijdschriften kunnen ontleend worden. Veel boeken zijn er nog niet, maar wij hopen er voldoende te krijgen, om onze leden zo goed mogelijk te kunnen documenteren en voor hen de mogelijkheid te scheppen zich te oefenen en te vervolmaken door middel van lektuur. Belangstellenden vragen inlichtingen bij

ĈU MONDA ORGANIZAĴO PRI SANO MALSANAS ?

Parolante antaŭ la Asembleo de MOS (Monda Organizaĵo pri Sano), blindulo, Sir John Wilson, prezidanto de la Monda Organizaĵo kontraŭ Blindeco, klarigis ke tute modera investo ebligus savi la vidpovon de milionoj da homoj. Kuraci trakomon, ĉefan kaŭzon de blindeco en la mondo, kostas nur 0,50 usonajn dolarojn (+ 20 bf.) por unu persono; protekti la okulojn de infanoj minacataj de kseroftalmio (ĉefa kaŭzo de blindeco ĉe infanoj) ne kostas pli ol 0,12 dolarojn (5 BF) jare por unu infano; en Hindio, oni redonis la povon vidi al dekdu mil kataraktuloj koste de 5 dolaroj (200 BF) por unu operaciito. Ĉu ne estas skandale ke oni ne sukcesas kolekti la necesan monon por kontraŭbatali tiujn malsanojn kaj savi la vidon al milionoj da homoj.

La delegitoj de la 145 ŝtatoj aŭskultis sen eĉ moviĝeti, sendube malĝojaj pri la neeblo trovi la monon necesan por malpezigi tiujn suferojn. Sed unu semajnon poste tiuj samaj delegitoj alprenis du rezoluciojn celantajn havigi al la araba kaj la ĉina la pozicion de laborlingvoj, kiu decido kostos al MOS kvin milionojn da dolaroj (200.000.000 BF) jare, t.e. sufiĉe por savi la vidpovon al dek milionoj da homoj trafitaj de trakomo.

Ŝajne la internaciaj organizaĵoj suferas pro mensmalsano nomata Babelo, kiu sorbas grandegan procenton de iliaj financaj rimedoj malprofite al la agado por kiu ili kreiĝis !

Pro manko de mono, MOS rezignis je multaj projektoj, inter kiuj ekzemple tiu pri bazaj higienaj laboroj en la Dominika Respubliko, kiu kostus 26.000 dol. (1.040.000 BF), sed ĝi pretas dediĉi 5.000.000 da dolaroj jare al pura administra aŭ kunsida laboro ! Kaj, tamen higieno estas bazo de publika sano ...

IS DE WERELDGEZONDHEIDSORGANISATIE ZIEK ?

In een toespraak voor de Algemene Vergadering van de WGO (Wereld-Gezondheids-Organisatie) verklaarde een blinde, Sir John Wilson, voorzitter van de Wereldbond tegen blindheid, dat een zeer gemiddereerde investering het gezicht zou redden van miljoenen mensen. De behandeling van het trachoom, hoofdoorzaak van blindheid in de wereld, kost slechts 0,50 US dolar (+ 20 BF) per persoon; het beschermen van de ogen van kinderen bedreigd met Xerofthalmie (hoofdoorzaak van blindheid bij de kinderen) kost niet meer dan 0,12 dol. (5 BF) per jaar voor een kind. In India werd aan twaalfduizend Cataractlijders het gezichtsvermogen terug gegeven tegen 5 dol. (200 BF) per geopereerde. Is het niet schandalig dat men er niet toe komt het nodige geld te verzamelen om die ziekten te bestrijden en het gezicht te redden van miljoenen mensen ?

De afgevaardigden van de 145 staten luisterden zonder ook maar een vin te verroeren, wellicht bedroefd over de onmogelijkheid het nodige geld te vinden om dat leed te verlichten. Een week later echter aanvaardden diezelfde afgevaardigden twee resoluties die ten doel hadden aan het Araabs en het Chinees het statuut van werктаal te verlenen; een beslissing die aan het WGO een bedrag van vijf miljoen dolar (200.000.000 BF) kost per jaar d.w.z. genoeg om het gezicht te redden van tien miljoen trachoomlijders.

Schijnbaar lijden de internationale organisaties aan een geestesziekte, Babel genoemd, die een enorm percentage van haar middelen opslorpt ten koste van de activiteiten waarvoor ze werden opgericht !

Wegens geldgebrek zag WGO af van veel projecten, waarvan bij voorbeeld dat omtrent de fundamentele saneringsmaatregelen in de Dominicaanse Republiek, die 26.000 dol. (1.040.000 BF) zou kosten, maar zij is bereid 5.000.000. dol. per jaar te spenderen aan zuiver administra en vergaderingswerk ! En toch is hygiëne de grondslag van openbare gezondheid ...

Kiel do ŝpari la milionojn senfrukte alskribitajn al plurlingveco, ne privilegiante iun ajn nacion lingve? Solvo ekzistas, sed bedaŭrindaj, obstinaj antaŭjuĝoj ĝis nun malhelpis ĝian aplikon sur interregistara nivelo.

Hoe dus de miljoenen, die vruchteloos aangewend worden voor meertaligheid, besparen zonder welke natie ook op taalgebied te bevoordeligen? Een oplossing bestaat, maar spijtige, koppige vooroordelen hebben tot nu toe haar toepassing op intergouvernementeel gebied verhinderd.

E S P E R A N T O !

L i m b u r g o

kiel evoluis ...

Fakte la esperanto-vento alvenis el Antverpeno. Unu el niaj klubanoj tie konatiĝis kun Esperanto, entuziasmiĝis pri ĝi kaj, post lernado de la lingvo, klopodis ĝin disvastigi en sia -nia- hejmlando.

Komence la agado limiĝis je malgranda kursorondo, kiu tamen disvastiĝis kaj kondukis al la starigo de grupo sufiĉe granda por aliĝi al la Belga Esperanto-Federacio kaj tiel tuj al la tutmonda movado, la Universala Esperanto Asocio. Tio okazis en januaro 1975.

Nun, post plia jaro, la grupo jam tiel kreskis, ke ni nombros kelkajn dekojn da esperantistoj kaj plurajn dekojn da amikoj kaj simpatiantoj, kiuj helpas al ni disvastigi la esperanto-ideojn kaj kunlaboras en niaj aktivecoj.

Kompreneble, por serioze labori, ni devas organizi diversajn aktivecojn, ĉu publike, ĉu en klubkunvenoj. Tio okazas principe ĉiujn duan kaj kvaran vendredon de la monato. Nia aktiveckalendaro regule aperas en ESPERANTO PANORAMA, la revuo de la Belga Esperanto Federacio, kiun cetere ĉiu abonanto al ĉi tiu revuo same ricevas.

Pli da detaloj pri niaj aktivecoj ni celas doni en nia ĉi tiea revuo, kiu servos samtempe kiel ligilon inter la Limburgaj esperantistoj, amikoj kaj simpatiantoj.

L i m b u r g

hoe het groeide ...

Feitelijk kwam de esperantewind uit Antwerpen. Een van onze clubleden maakte daar kennis met Esperanto, werd er enthousiast over en, na de taal geleerd te hebben, trachtte hij ze te verbreiden in zijn -ons- heimatland.

In het begin bleef de werking beperkt tot een kleine cursusgroep, die toch uitbreiding nam en leidde tot de oprichting van een groep die belangrijk genoeg was om aan te sluiten bij de Belgische Esperanto-Federatie en aldus meteen bij de wereldbeweging, de Universele Esperanto Associatie. Dat gebeurde in januari '75

Nu, na een jaartje meer, is de groep zodanig gegroeid dat wij enkele tientallen esperantisten tellen, naast verscheidene tientallen vrienden en sympathisanten die ons helpen de esperanto-ideeën te verspreiden en meewerken aan onze activiteiten.

Natuurlijk, om serieus te werken, moeten wij diverse activiteiten organiseren, hetzij publiek, hetzij in clubverband. Dat gebeurt in principe de tweede en vierde vrijdag van de maand. Onze activiteitenkalender verschijnt geregeld in ESPERANTO PANORAMA, het blad van de Belgische Esperanto Federatie, dat trouwens iedere abonnee op dit blad eveneens ontvangt.

Meer details over onze activiteiten nemen wij ons voor u te geven in dit tijdschrift, dat overigens ook zal dienen als band tussen de Limburgse esperantisten, vrienden en sympathisanten.



Kio estis ...

Unu el la plej elstaraj aktivevecoj de la nuna jaro estis sendube nia partopreno en la Eùropa Esperanto Kongreso, dum la Paska-semajnfino, en Eindhoven, kie renkontiĝis esperantistoj el 20-oda landoj. Eĉ el Islando kaj Japanio, samkiel el Usono ili venis.

Alia signifoplena aktiveco^a estis nia partopreno en la Internacia renkontiĝo de la Fervjistoj esperantistoj en Blankenberge je la 1-a de majo. Neforgesebla estis la longa promenado en la natur-rezervato "Zwin", en Knokke.

Neforgesebla ankaŭ estas nia sukcesplena aranĝo en nia propra grupo, je sabato 12-a de junio; nome nia 'pikniko'.

Partoprenis multaj amikoj el Antverpeno, Lieĝo kaj Vervierso. Bedaŭrinde niaj samideanoj el Eupen kaj Welkenraedt ne reagis nian inviton.

Nia renkontiĝo konsistis el agrabla promenado, per longa vico, laŭlonge la "malnova Mozo", tra la kamparo al la "nova Mozo", kie, ĉe la pramo transmoza, sur la teraso de la trinkejo, ĉe nia amiko Jan Derhaeg, okazis la ĉefprogramero : la pikniko.

Videble la buterpanoj malaperis inter la makzelojn de la promenintoj ..

La pramestro ankaŭ afable pretis nin veturi trans la Mozon Nederlanden kaj reen.

Post sufiĉe da ripozo, ni repromenis al Stokkem, por adiaŭi.

El la laŭdaj adiaŭ-esprimoj ni komprenis ke ĉiu estis kontenta kaj eĉ ke venonta tia aranĝo estus bonvena ..

Grave estas ke la ĉefaj celoj de la okazintaĵo atingiĝis, nome la interkonatiĝo kaj interamikiĝo samkiel la pruvo ke Esperanto utilas, eĉ en propra lando.

Malĝojige tamen estas ke unu el la partoprenintoj, S-ro Jos Van Den Eynde el Antverpeno, tiun saman vesperon, subite mortis.

Al liaj geparencoj kaj gefamilianoj ni sincere kondolencas.

... estas ...

Dank al la laboro de niaj aktivuloj, ni verŝajne gajnos la premion Jennen, t.e. premio aljuĝota de B.E.F. al la plej aktiva grupo de la jaro.

Wat was ...

Een van onze meest hoogstaande activiteiten van dit jaar wad ongetwijfeld onze deelname aan het Europees Esperanto Congres, tijdens Paas-week-end, in Eindhoven, waar' esperantisten uit een 20-tal landen zich ontmoetten. Zelfs uit IJsland, Japan en USA kwamen ze.

Een andere betekenisvolle activiteit was onze deelname aan de Internationale bijeenkomst van de Spoorwegmannen-esperantisten en Blankenberge. Onvergetlijk is de lange wandeling in het natuur-reservaat "ZWIN", te Knokke.

Onvergetlijk is ook onze succesvolle regeling in onze eigen groep, op zaterdag 12 juni; nl. onze picknick.

Vele vrienden uit Antwerpen, Luik en Verviers namen er aan deel. Spijtig genoeg kwam er geen rectie op onze uitnodiging vanwege onze geestesverwanten uit Eupen en Welkenraedt.

Onze ontmoeting bestond uit een aangename wandeling, in een lange rij, langs de "Oude Maas", doorheen het veld, naar de "Nieuwe Maas", waar, aan het veer over de Maas, op het terras van het café bij onze vriend Jan Derhaeg, de hoofdbrok van de dag plaats vond : onze picknick.

Zienderogen verdwenen de boterhammen tussen de kaken van de wandelaars.

De veerman was ook zo vriendelijk ons even over en weer naar Nederland te varen.

Na voldoende rust, wandelden wij terug naar Stokkem voor het afscheid.

Uit de lovende afscheidswaarden begrepen wij dat iedereen tevreden was en zelfs dat een dergelijke regeling in de toekomst welkom zou zijn ..

Belangrijk is dat de hoofdbedoelingen van het gebeuren bereikt werden, nl. de kennis-making, de "bevriending" evenals het bewijs dat Esperanto nut heeft, zelfs in eigen land.

Droevig echter is dat een van de deelnemers, M. Jos Van de Eynde uit Antwerpen, diezelfde avond schielijk overleed.

Aan zijn verwanten en familieleden onze oprechte deelneming.

... is ...

Dank zij het werk van onze actieve leden, gaan wij waarschijnlijk de premie Jennen winnen, dat is een premie die door B.E.F. uitgekeerd wordt aan de meest actieve groep van het jaar.

... estos ...

... zal ...

Rilate niajn normalajn klubkunvenojn, ni referencas al nia programa en ESPERANTO PANORAMA.

Voor onze normale clubbijeenkomsten verwijzen naar ons programma in ESPERANTO PANORAMA.

Okazos tamen io tre speciala, nome nia vizito al la karbominejo de Eisdën, je sabato 7-a de aùgusto ja la 9-a horo.

Er gebeurt echter iets zeer speciaals, nl. ons bezoek aan de kolenmijn te Eisdën op zaterdag 7 augustus om 9 uur.

Jen la kondiĉoj :

Hier de voorwaarden :

Enskribiĝo ĝis late la 15-a de julio ĉe nia sekretariino aù iu alia estrarano.

Inschrijven ten laatste op 15 juli op het secretariaat of bij een bestuurslid.

Aĝo : viroj : 16 - 60 jaraj
virinoj : 16 - 55 jaraj
Personoj malpli aĝaj ol 21 jaroj bezonas skriban permeson de la gepatroj.

Leeftijd : mannen : 16 - 60 jaar
vrouwen : 16 - 55 jaar
Personen onder 21 jaar behoeven een geschreven toelating van de ouders.

Prezo : 130 F. por unu persono
Necesaj informoj por la enskribiĝo :
- nomo, antaùnomo kaj adreso
- naskiĝdato
- ŝu-mezuro

Prijs : 130 F. per persoon.
Nodige inlichtingen bij de inschrijving :
- naam, voornaam en adres
- geboortedatum
- schoenmaat.

Kunporti je la vizito : ŝtrumpojn, poŝtukon, kapkovrilon (sub-kaskilon), mantukon, kombilon kaj sapon.

Meebrengen voor het bezoek : kousen, zakdoek, hoofdeksel (mutsje voor onder de helm) handdoek, kam en zeep.

La minejo pruntas : jakon, pantalonon, ĉemizon, ŝuojn, kaskon, zonon.

De mijn leent : jasje, broek, hemd, schoenen, helm, riem.

Kunveno kaj foriro en Stokkem antaù la preĝejo je la 8,30 horo matene.

Samenkomst en vertek in Stokkem aan de kerk om 8.30 u.

Bona konsilo : bone matenmanĝu, ĉar la vizito daùros ĝis post la 12-a horo !

Een goede raad : neem een stevig ontbijt, want het bezoek duurt tot na 12 uur !

Alia speciala okazontaĵo estas nia balo je la 5-a de septembro je la 19-a h. en la Festsalonego St. Elisabeth en Stokkem, al kio ĉiu estas kore invitata. (vidu ankaù ESPERANTO PANORAMA)

Een andere speciale gebeurtenis is ons bal op 5 september om 19 uur in de Feestzaal St. Elisabeth in Stokkem. (zie ook ESPERANTO PANORAMA)

Ĝis nun ĉiuj niaj aktivecoj okazis en Stokkem. Tiu tamen ne estas nepre la celo. Ĉiuj Limburganoj kiuj havas bonajn ideojn kaj la necesan kuragon por ion entrepreni, bonvolu sin konigi por ke ni povu helpi kaj kunlabori. Antaùan dankon !

Tot nu toe vonden al onze activiteiten in Stokkem plaats. Dat is echter niet per se de bedoeling. Alle Limburgers met goede ideën én de nodige moed om iets te ondernemen, worden verzocht zich kenbaar te maken opdat wij kunnen helpen en samenwerken. Dank bij voorbaat !

Korespondi deziras ...
pri muziko, lingvoj, fotografio kaj amator-kino :

Wenst te corresponderen ...
over muziek, talen, fotografie, amateur-filmen :

Jorge Valencia
Av. Comandante Espinar 408
Lima 18
Perù

Frans Claessens, la patro de nia sekretario, travivis, dum la dua Mondmilito, la teruraĵojn de la Nazi-germanaj koncentrejoj.

Por siaj edzino kaj infanoj (li edziĝis post sia rehejmenveno) kaj siaj aliaj parencoj kaj amikoj, li surpaperigis siajn tiamajn memoraĵojn.

Temas pri simpla, senpretenda, honesta rakonto de kio li persone travivis, sen ia ajn alia fatasiaĵo.

Li donis al ni sian permeson traduki kaj publikigi sian rakonton sub formo de felietono.

Jen la unua parteto :

K A P I T O N u m e r o

1 3 4 . 8 4 9

marto 1943 -

majo 1945

Frans Claessens, de vader van onze secretaresse, onderging, tijdens de tweede Wereldoorlog de verschrikkingen van de Nazi-Duitse concentratiekampen.

Voor zijn vrouw en kinderen (hij trouwde na zijn terugkeer)*stelde hij zijn toenmalige herinneringen op schrift.

*en voor zijn andere verwanten en vrienden, Het is een eenvoudig, pretentieloos, eerlijk verhaal van wat hij persoonlijk beleefde, zonder te fantaseren over andere dingen.

Hij gaf ons zijn toestemming zijn verhaal te vertalen en te publiceren onder vorm van een feuilleton.

Hier het eerste deeltje :

G E V A N G E N E N u m m e r

1 3 4 . 8 4 9

maart 1943 -

mei 1945

1940 - Neatendite, je la 10-a de majo matene, la germanaj armeoj invadis nian landon. La antaŭan vesperon ni ankoraŭ agrable parolis kaj ridis kun kelkaj soldatoj, kampaditaj ĉe la landlimo. Nenio permesis supozi tiun bruskan kaj subitan surprizatakon. Ĉirkaŭ la 4-a kaj duono mi estis vekita de mia frato kiu, kiel rezerv-serĝento, kurieris inter diversaj limpostenoj. "Nun la afero fariĝis serioza, milito estas" rakontis li senspire. La terura signifo nur malrapide klariĝis al mi.

Milito ! Ni jam aŭdis niajn gepatrojn kaj aliajn malplijunajn homojn rakonti pri la milito 1914-1918, sed klare imagi ĝin, ni ne povis. Nu, ĝi certe estos tre grava, kaj viktimoj estos multaj, sed nu .. estos denove io alia ol la ĉiutaga rutinaĉo.

Tamen, mi ne estis tute trankvila, des pli, ĉar mia frato estis rekte implikita en la operacioj.

Dume ni aŭdis la zumadon de multaj aviadiloj. Mia frato jam estis for, post rapida adiaŭo, kaj mia patro kaj mi nin vestis kaj eliris por iom rondrigardi.

1940 - Onverwacht vielen op 10 mei 's morgens de Duitse legers ons land binnen. 's Avonds voordien hadden wij nog genoeglijk zitten praten en lachen met enkele van de soldaten die aan de grens gelegerd waren. Rond 4.30 u werd ik gewekt door mijn broeder die, als reservesergeant de dienst van koerier tussen de verschillende grensposten vervulde. "Nu is het menens, het is oorlog" vertelde hij ademloos. De verschrikkelijke betekenis van die woorden drong slechts langzaam tot mij door.

Oorlog ! We hadden onze ouders en oudere mensen horen vertellen over de oorlog 1914-1918, maar echt voorstellen wat het was, neen dat ging niet. Het zou wel iets heel ergs zijn en er zouden ook wel slachtoffers vallen, maar ja, het was weer eens iets anders als de dagelijkse sleur.

Toch was ik er niet helemaal gerust in, te meer daar mijn broeder al onmiddellijk bij de operaties betrokken was.

Wij hoorden intussen het geronk van vele vliegtuigen. Mijn broeder was weer vertrokken na een vluchtig afscheid en mijn vader en ik kleedden ons en gingen buiten een kijkje nemen.

Ni loĝis en trankvila strato kaj, krom la bruoj de superflugantaj aviadiloj, multe da militaĵo ne estis rekonebla. Ni aŭdis malproksimajn, laŭtajn kaj obtuzajn knalojn, do, ni supozis ke ie falis bomboj. Ĉi tio jam iom proksimiĝis nin al la realeco kaj, kiam ni aŭdis en la najbareco, tak-tak-tak-ojn de fusiloj aŭ maŝinfusiloj, ankaŭ ni sciis ke estas ege serioze.

We woonden in een stille straat en buiten het geronk van vele overtrekkende vliegtuigen was er van oorlogsgeweld niet veel te bespeuren. In de verte hoorden wij wel harde doffe slagen en we verondertsleden dat er ergens bommen vielen. Dit bracht ons toch al dichter bij de realiteit en toen we dan in de nabijheid het tak-tak-tak van geweren of machinegeweren hoorden wisten ook wij dat het bittere ernst was.

Ni, la 18 ĝis 20 jaruloj, kvankam ni volis, ne plu povis kuniĝi kun la armeo ĉar la Belgaj trupoj eksplodigis la pontojn super la Sud-Villemskanalo por malhelpi la almarŝon de la Germanoj. Ni do povis nur observi la germanajn hordojn rapidege akapari nian landeton. Kontraŭ ĉiu atendo, la okupantoj konduktis korekte la unuajn tagojn kaj semajnojn. Sed iom post iom la situacio ridiĝis. La grandnombraj dekretoj de la okupantestrarone plibonigis ĝin. Male ! Pli kaj pli la loĝantaro amasiĝis. Ke aroj formiĝis el tiuj kiuj ne akordiĝis kun la pli kaj pli teroriganta aktivecoj de la okupantoj, estas ne pli ol komprenebele. Des pli ke Belgioj, samvilaganoj, interkonsentantaj kun la malamikoj, sin sentis fortaj kaj laŭlitere provokis la plimulto da enloĝantoj kiuj estis kontraŭgermanaj.

Wij, de 18 tot 20-jarigen, konden, afschoon wij daar wel lust toe voelden, het leger niet meer verwoegen omdat de bruggen over de Zuid-willemsvaart al dadelijk in de lucht geblazen werden door het Belgische leger met het doel de opmars van de Duitsers zo veel mogelijk te belemmeren. Wij konden dan ook maar alleen lijdzaam toezien hoe de Duitse horden in een ommezien ons landje inplanden. Buiten alle verwachting in gedroeg de bezetter zich die eerste dagen en weken uiterst korrekt. Maar geleidelijk aan verstrakte de toestand en de talrijke verredeningen die door de bezettende overheid uitgevaardigd werden, vebeterde de toestand niet. Integendeel ! Meer en meer geraakte de bevolking verbitterd. Dat er kernen gevormd werden die niet akkoord gingen met de stilaan tot terreurdaden uitgroeiende activiteit van de bezetter, was niet meer dan normaal. Temeer dat Belgen, dorpsgenoten, met de vijand meeheulden, zich sterk voelden en de meerderheid van de bevolking, die anti-Duits was, letterlijk uitdaagden.

La situacio ne povis daŭri. Io devis esti farita por montri al la Germaninklinaj samvilaganoj, kiuj en malmulte da tempo iĝis niaj malamikoj, ke estas ankoraŭ Belgioj kiuj kredas en demokratio kaj kiuj restas fidelaj al siaj Reĝo kaj Patrujo.

De toestand kon zo niet blijven. Er moest iets gedaan warden om, bijzonder aan die Duitsgezinde dorpsgenoten, die op korte tijd onze vijanden geworden waren, te tonen dat er nog Belgen waren die geloofden in democratie en die trouw bleven aan hun Koning en hun Vaderland.

En nia amikaro estis kelkaj malplijunaj, spertaj homoj. Ili sin taskus kunigi junulojn kiuj kuraĝas sekrete kontraŭbatali la malamikojn.

We hadden in onze vriendengroep enkel ouderen, mensen met ervaring. Zij zouden die taak op zich nemen en proberen jongeren samen te brengen die het wilden wagen in het geheim

La gvidanto, unu el la plej junaj volontuloj el la milito 1914-18, kaj alia, purrasa Bruselano, trejnisto de junularfutbalklubo, havis sufiĉe da kontaktoj kun la junularo kaj sciis kiuj fidelaj dindaj estas kaj kiuj kuraĝas aliĝi rezistadaron.

de strijd aan te gaan met onze vijanden. De leider was reeds in de oorlog 1914-18 als een van de jongste Belgische vrijwilligers in dienst gegaan, de andere, een rasechte Bruselaar, trainer van de jeugdvoetbalploeg hadden genoeg contact met de jeugd en wisten ook wie te vertrouwen was en wie het zou

La filo de ĉi lasta, kiu samtempe estis mia plej bona amiko, faris konfidoncon al mi kaj tiel mi ĉeestis la unuan sekretan kunvenon. Ĉio fariĝu ege singarde kaj proprainiciate, ĉar kontakti la registaron en Anglujo, tiam kompreneble ankoraŭ ne eblis. Tamen la tasko estis entuziasme komencita kaj formiĝis ĝro da personoj kiuj meminstanace zorgu pri varbado de fidindaj junuloj kiuj al ni estis bonvolaj. Post kelke da semajnoj ni formis aron de dekvino da junaj, decidemaj kaj entuziasmegaj knaboj.

Multe ne estis farebla en tiuj unuaj monatoj. Jes, intertempe ni kontaktiĝis kun aliaj grupoj kiuj jam kontaktis Anglujon, sed veraj, gravaj taskoj nur malofte atingis nin. Jam nur la konscio tamen ke ni kuraĝis kontraŭstari la okupantaron kaj ĝian perfidularon, esti de la alia flanko, plenigis nin per fiero kaj devokonscio: la devo batali por nia patrujo, ĉiamaniere kaŭzi malprofiton al la okupantaro kaj pecetigi iom post iom ĝiajn potencojn kaj fieron.

Dum la monatoj pasis, niaj taskoj en la movado tamen iom pli gravaj iĝis, eĉ pli danĝeraj, sed pri vera aktiva agado ankoraŭ tute ne estis parolo. Tamen niaj rangoj ankoraŭ kompletiĝis per novaj membroj, zorge elektitaj kaj testitaj. Anti-germanaj sloganoj aperis sur muroj kaj stratoj; io, pri kio la loĝantaro kaj ni mem havis multe da plezuro. Sekretaj gazetoj aĉetiĝis amase kaj disdoniĝis senpage inter la loĝantaro.

Ĉiuj el tiuj aktivecoj nun, jarojn post la milito, ŝajnas eble sensignifaj, sed tiam ili estis por ni stroĉo, aventuro, danĝero kaj, se ni estus kaptitaj, severaj punoj. Efektive, tio estis "kunlaboro kun la malamiko"! Ĉu temas pri disdoni sekretajn foliojn, varbi membrojn, skribi anti-gemanajn sloganojn, tranĉi telefondratojn aŭ ekplodigi fabrikojn, ĉio estis traktita tute same.

aandurven tot een verzetsbeweging toe te treden.

Door de zoon van deze laatste, die tevens mijn beste vriend was, werd ik in vertrouwen genomen en was ik aanwezig op de eerste geheime vergadering. Alles moest uiterst voorzichtig gebeuren en op eigen initiatief, want verbinding met de regering in Engeland bestond toen vanzelfsprekend nog niet. Toch werd de zaak geestdriftig aangepakt en werd een kern gevormd die in eerste instantie zorgen moest voor aanwerving van betrouwbare jongeren die ons gunstig gezind waren. Na enkele weken vormden we een groep van een 15-tal jonge, vastberaden en van geestdrift blakende kerels.

Veel viel er die eerste maanden niet te doen. We hadden intussen reeds contact met andere groepen die wel reeds in verbinding met Engeland waren, maar echte, belangrijke opdrachten kwamen niet of maar schaars door. Maar het besef alleen dat we het aandurfdien de bezetter en zijn verradersklik te trotseren, aan de andere kant te staan, vervulde ons met trots en plichtsbesef: de plicht om te strijden voor ons vaderland, de bezetter op alle mogelijke manieren nadeel te berokkenen en zijn macht en trots steentje voor steentje af te breken.

Naargelang de maanden verliepen, werden onze opdrachten in de beweging toch iets belangrijker en ook gevaarlijker, maar van werkende actief optreden was er hoegenaamd nog geen sprake. Wel werden onze rangen nog aangevuld met een aantal nieuwe leden, zorgvuldig uitgezocht en getest. Anti-Duitse leuzen werden op muren en straten geschreven, iets waar de bevolking en vooral wijzelf veel plezier aan beleefden. Sluikblaadjes werden aangekocht, massa's, en gratis onder de bevolking verspreid.

Elk van die activiteiten is nu, jarem na de oorlog, misschien nietszeggend, maar in die tijd was dat voor ons spanning, avontuur, gevaar en als we gesnapt werden, strenge straffen. Inderdaad, dit was "medewerking met de vijand"! en of het ging om verspreiden van sluikbladen, aanwerven van leden, anti-Duitse slogans schrijven, telefoondraden doorknippen of een fabriek in de lucht laten vliegen, het werd allemaal op gelijke voet behandeld en berecht.

(daŭrigota)

(wordt vervolgd)

LIMBURGAJ ESPERANTO NOVAĴOJ

aperas sub la respondeco dela
Limburga Esperanto Grupo

Pri ensenditaj artikoloj respondecas
tamen la ensendintoj mem.

Redakci-adreso / Sekretariejo :

Kortestraat, 2 3630 EISDEN/MAASMECHELEN

Kasistino :

Eliane Claessens : Konto 001-0377625-80

Abonprezo, kiu rajtigas samtempe je
abono al ESPERANTO PANORAMA

50 BF

LIMBURGS ESPERANTO NIEUWS

verschijnt onder verantwoordelijkheid
van de Limburgse Esperanto Groep.

Voor ingezonden stukken blijven de
inzenders echter zelf verantwoordelijk.

Redactieadres / Secretariaat :

Penningmeesteres :

Abonnementsprijs, die meteen ook recht
geeft op een abonnement op ESPERANTO PANORAMA

Bestuur van L.E.G.

Estraro de L.E.G.

Prezidanto

Jan Bovendeerd

Voorzitter

Vice-prezidanto

Pierre Woestenborghs

Onder-voorzitter

Sekretariino/Kasistino

Eliane Claessens

Secretaresse/Penningmeesteres

Membroj

Roger Vranken

Leden

Piet Jacobs

Gerry Detrez

Dokumentaservo

Documentatiedienst

Medaerstraat, 11 3650 STOKKEM/DILSEN

KOTIZOJ/

LIDGELDEN

B.M.	Bonfaranta membro kun revuo	400	Steunend lid met maandblad ESPERANTO
M.	Membro kun revuo	300	Gewoon lid " " "
M-SR	Membro sen revuo	200	" " zonder " "
JM	Junula membro kun revuo	150	Jeugdlid met " "
	16 - 25-jara		16 - 25 jaar
JM-SR	Junulara membro sen revuo	100	Jeugdlid zonder " "
KM	Kadeta membro -gis 16 j.	50	Kadet - tot 16 jaar
FM	Familia membro (kunloganta)	75	Gezinslid (inwonend)
K	Kursano	100	Cursist

Amiko de Esperanto kun :

50 Vriend van Esperanto met

LIMBURGAJ ESPERANTO NOVAĴOJ
ESPERANTO PANORAMA

LIMBURGS ESPERANTO NIEUWS
ESPERANTO PANORAMA

Ĉu vi volas al ni helpi ?

Wilt u ons helpen ?

Transdonu ĉi tiun revueton al amiko aŭ
konatulo, aŭ .. "forgesu" ĝin ie ..

Geef dit blad door aan een vriend of
kennis, of .. "vergeet" het ergens ..

Dankon.

Dank u.

LIMBURGS ESPERANTO NIEUWS
LIMBURGAJ ESPERANTO NOVAĴOJ
Driemaandelijks / Trimonata
tijdschrift revuo
Kortestraat 2
B-3630 EISDEN/MAASMECHELEN

5.00 g. De Bronnen
Maaspedaleven straat 29
8500 kerstijk

